

JARO I.  
N.º 9.ª 33

# LA SUNO HISPANA

Hispana Societo por propagando  
DE ESPERANTO

## AKTO

S.ºj  
ĉeestantaj:

*Fiménez*  
*Vidal*  
*Aguirre*  
*Guinart*

FORESTANTAJ  
KAJ KUN  
RIPREZENTO

*Codorniu*  
*Villanueva*  
*Inglada*  
*Benavente*

En la urbo Valencio la 5<sup>an</sup> de Junio de 1904, post kunveno de la Sinjoroj apudflanke notitaj en la sidejo de la Esperantista Grupo Valencio, Kaj sub prezido de S.º Jimenez, oni aprobis la akton de la lasta Kunsido kaj la kontojn prezentitaj de la kasisto, kies resumo jen estas:

Enspezoj, 71'15 pesetoj; elspezoj, 7. Restas en kaso, 64'15.

Oni prezentis poste proponon de S.º Benavente doni la titolon de divastiganta al la adepto S.º Serafino Villarroya el Teruelo, al kio oni konsentis. Sama donaco estis farata al S.º Eduardo Segarra el Manreso, laŭ peto de S.º Jimenez.

Tuj oni aprobis la aĉeton de kvin ekzempleroj de la nova *Tutmonda Jarlibro Esperantista* ĵus eldonita, kiel rime-do tre utila por la propagando. Tion ĉi proponis S.º Sekretario.

Sama S.º esprimis ideon verki por la venonta jaro 1905 almanakon aŭ jarlibron, kiu enhavos: 1.º ĝeneralan santularon. 2.º La aktojn aŭ protokolojn de la kunsidoj havitaj de *Hispana Societo* dum

Sociedad Española para propagación  
DEL ESPERANTO

## ACTA

Sres.  
presentes:

*Fiménez*  
*Vidal*  
*Aguirre*  
*Guinart*

CONREPRESENTACIÓN

*Codorniu*  
*Villanueva*  
*Inglada*  
*Benavente*

En la ciudad de Valencia á 5 de Junio de 1904, reunidos los señores anotados al margen en el domicilio social del Grupo Esperantista de Valencia y bajo la presidencia del Sr. Jiménez, se aprobó el acta de la sesión anterior y las cuentas presentadas por el depositario, cuyo resumen es como sigue:

Cargo: 71'15 pesetas; data, 7. Quedan en caja 64'15.

Después se presentó la proposición del Sr. Benavente de dar el título de propagandista al socio D. Serafín Villarroya, de Teruel, en lo cual se consintió. Lo mismo se hizo en obsequio del Sr. D. Eduardo Segarra, de Manresa, á petición del Sr. Jiménez.

Acto seguido se aprobó la compra de cinco ejemplares del nuevo *Anuario Esperantista de todo el mundo* que acaba de aparecer, como un medio utilísimo para la propaganda. Esto fué propuesto por el señor secretario.

El mismo señor expresó la idea de hacer para el año próximo 1905 un almanaque ó anuario que contenga: 1.º El santoral ordinario. 2.º Las actas de las sesiones celebradas por la *Hispana So-*

la nuna jaro 1904. Tio anstataŭ tre bone la apartan presigon kaj sendadon de ĉiu el aktoj al la anoj de *Hispana Societo*, je kio estis devigita Direktoro de LA SUNO HISPANA; ĉar la dirita almanako estos disdonata senpage al ĉiu el la anoj. La kosto de tiu ĉi eldonajo estas pagota de la *Hispana Societo* kun helpo de la duono de sumo kiun Direktoro ricevas el la dirita societo. 3.<sup>e</sup> Nomaron de la anoj de *Hispana Societo* p. p. Esperanto, laŭ ordo de ilia enskribo. 4.<sup>e</sup> Nomaron kaj adresaron de la hispanaj esperantistoj laŭ la alfabeto ordo de provincoj kaj lokoj. 5.<sup>e</sup> La esperantistajn hispanajn societojn. 6.<sup>e</sup> Kelkajn prozajn kaj versajn verkojn intermetitajn kun komercaj anoncoj. Kion estis tute aprobata.

Oni decidis ankaŭ sciigi al redakcio de LA SUNO HISPANA nian deziron aliĝi tutkore al la protesto eldonita en ĝia numero de Majo lasta, pri la maljusta rajto kiun aroĝis al si amerika ĵurnalo ŝanĝi sisteme la alfabeton de esperanto.

Kaj ne havante plu da aferoj pritraktotaj, finiĝis la kunsido, kaj pri ĉio mi la sekretario certigas.—*Ant.<sup>o</sup> Guinart.*—Subskribita.—V.<sup>o</sup> B.<sup>o</sup>.—P. O.: *A. Fiménez Loira*, vicprezidanto.—Subskribita.

*cieto* durante el año pasado 1904. Esto sustituirá perfectamente la impresión aparte y el envío de cada una de las actas á los socios de la *Hispana Societo*, á lo cual se había comprometido el director de LA SUNO HISPANA, ya que dicho almanaque será repartido gratis á cada uno de los socios. Los gastos de esta edición serán abonados por la *Hispana Societo*, con la ayuda de la mitad de la suma que el director percibe de dicha sociedad, 3.<sup>o</sup> La lista de todos los miembros de la *Hispana Societo* por el orden de su inscripción. 4.<sup>o</sup> La lista de todos los esperantistas españoles, por orden alfabético de provincias y localidades. 5.<sup>o</sup> Las sociedades esperantistas de España. 6.<sup>o</sup> Algunas composiciones en prosa y verso mezcladas con anuncios de comercio. Lo cual fué todo aprobado.

También se decidió comunicar á la redacción de LA SUNO HISPANA nuestro deseo de adherirnos de todo corazón á la protesta publicada en su número del pasado Mayo, sobre el injusto derecho que se ha arrogado un periódico americano para cambiar sistemáticamente el alfabeto Esperanto.

Y no teniendo otro asunto de que tratar se levantó la sesión, de todo lo cual yo el secretario certifico.—*Antonio Guinart.*—Hay una rúbrica.—V.<sup>o</sup> B.<sup>o</sup>—P. O.: *A Fiménez Loira*, vicepresidente.—Hay una rúbrica.

## La Anglaj Esperantistoj

EN BULONJO s-m (1)

La Bulonja grupo estis invitinta la anglajn grupojn pasigi en Bulonjo la Pentekostan libertempon.

Dekkvino da deligitoj inter kiuj du

(1) Speciale rakontita de nia kara samideano sinjoro Alfredo Michaux por la abonantoj de LA SUNO HISPANA.

## Los esperantistas ingleses

EN BOULOGNE s-m

El grupo de Boulogne había invitado á los grupos ingleses á pasar en Boulogne las vacaciones de Pentecostés.

Una quincena de delegados, entre



sinjorinoj, akceptis la inviton. Oni volis provi praktike ĉu la elparolado de Esperanto estus simila por angloj kaj francoj kaj ĉu interparolado estus simile facila inter malsimilaj nacioj.

Hodiaŭ oni ne povas plu dubi. Sabaton lastan la angla ŝipo ne estis ankoraŭ tute haltigita kiam la anglaj kaj francaj esperantistoj jam interŝanĝis la saluton kaj la bonvenajn parolojn. Tio estas mirinde vidi la gajecon de ĉiuj dum la elŝipiĝo.

Ĉiafoje kiam oni ekvidis verdan stelon de nova alvenanto, la francaj esperantistoj ekkriis gratulante lin kaj la angloj respondis tuje kaj parolis sensanceliĝi.

Ili estis akceptaditaj de S.<sup>ro</sup> Farmer angla konsulo, kaj de S.<sup>ro</sup> Michaux, prezidanto de la loka grupo kun kelkaj deligitoj de aliaj francaj urboj: S.<sup>ro</sup> Deligny de S.<sup>ta</sup> Omero, Wicart kaj Lamère, de Roubaix, S.<sup>ro</sup> Boulet de Rouen.

La angloj estis kondukitaj en la hotelon «Castiglione» kies la estro estas esperantisto. Dum la vespero la angloj ĉeestis en la Kontinenta Kafejo je festo organizata pro ilia vizitado. Esperantaj paroladoj, deklamoj, kantoj estis tre aplauditaj; la angloj tre bone kaj humore respondis.

Ni devas speciale citi S.<sup>ra</sup> Reeve kies la paroladeto estis tute ĉarma kaj ankaŭ S.<sup>ra</sup> Mudie kiu recitadis tre kompreneble kun franca esperantisto scenon de «Hamlet». La direktoro de *The Esperantist* S.<sup>ro</sup> Mudie parolas esperanton kvazaŭ sian nacian lingvon, deklamis la teatrajn verkojn tute mirinde.

Dum la tri festaj tagoj niaj vizitantoj volis paroli nur esperante kaj ili estis agrable surprizitaj vidante kiom da Bulojnanoj ilin povis kompreni. Tiel ĉarmitaj, ili promesis reveni dum la Somero kun multaj amikoj.

Unu el ili S.<sup>ro</sup> Farnes kiu ne scias eĉ unu vorton francan loĝas ĉe ni por kelka tempo (29 Strato Wissocq) kaj estas tute preta klarigi al siaj samlandanoj en Bu-

ellos dos señoras, aceptaron la invitación. Se quería experimentar prácticamente si la conversación del esperanto sería semejante para ingleses y franceses, é igualmente fácil entre personas de distinta nación.

Hoy no se puede ya dudar. El sábado último, el buque inglés aun no se había detenido del todo, cuando los ingleses y franceses esperantistas ya habían cambiado el saludo y palabras de bienvenida. Era admirable ver la alegría de todos durante el desembarco.

Cada vez que se veía la verde estrella de un nuevo llegado, los esperantistas franceses le felicitaban, y el inglés respondía en seguida y hablaba sin vacilar.

Fueron recibidos por el Sr. Farmer, cónsul inglés, y por el Sr. Michaux, presidente del grupo local, con algunos delegados de otras ciudades francesas: señor Deligny de St. Omer, Wicart y Lamere, de Roubaix, Sr. Boulet de Rouen.

Los ingleses fueron conducidos al hotel «Castiglione», cuyo dueño es esperantista. Durante la tarde, los ingleses estuvieron en el Café Continental en una fiesta organizada con motivo de su visita. Los discursos en esperanto, las declamaciones, los cantos, fueron muy aplaudidos; los ingleses respondieron muy bien y humorísticamente.

Debemos citar especialmente al señor Reeve, cuyo discursito fué todo encantador, y también al Sr. Mudie, que recitó de manera muy comprensible con un esperantista francés la escena de «Hamlet». El director de «The Esperantist», señor Mudie, habla el esperanto como su lengua nacional; declamó las obras teatrales muy admirablemente.

Durante los tres días de fiesta, nuestros visitantes no quisieron hablar más que en esperanto, y quedaron agradablemente sorprendidos, viendo los muchos buloñeses que les comprendían. De tal modo encantados, prometieron volver durante el verano con muchos amigos.

Uno de ellos, el Sr. Farnes, que no sabe ni una palabra de francés, habitará entre nosotros durante algún tiempo (calle de Wissocq, núm. 29), y está del



lonjo facilecon kaj utilecon de Esperanto.

Hodiaŭ okazas novaj eksperimentoj ankau simile konvinkeblaj.

Gimnastistoj el Bohemujo venintaj por Ekspozicio en Arras venis interparoladi esperante kun la grupanoj de Bulonjo.

Esperantistoj austraj, francaj, anglaj interparolas sen ia ŝanceliĝo. Multaj skeptikuloj vidinte kaj aŭskultinte tion en Bulonjo nun konvertiĝas dirante «mi ne povas plu dubi». Kelkaj tuje iĝas apostoloj kaj aliajn konvertas. ĝis la lastaj jaroj, esperanto estis uzata preskaŭ nur por skribaj rilatoj. Estas nun provite ke la lingvo internacia taŭgas tiom bone por la paroladoj. Tial esperanto estas nun lernota en ĉiuj urboj viziteblaj de fremdulaj turistoj.

Baldaŭ sen nebulo brilegos la esperanta suno.

todo decidido á explicar á sus compatriotas de Boulogne la facilidad y utilidad del esperanto.

Hoy tienen lugar nuevos experimentos igualmente convincentes.

Unos profesores de Bohemia que vinieron para la exposición de Arras, se llegaron á Boulogne para hablar en esperanto con los socios del grupo.

Esperantistas austriacos, franceses é ingleses hablan entre sí sin ninguna vacilación. Muchos escépticos, viendo y oyendo esto en Boulogne, se convierten diciendo: yo no puedo ya dudar. Algunos, desde luego, se transforman en apóstoles y convierten á otros. Hasta los últimos años, el esperanto fué usado casi exclusivamente para comunicaciones por escrito. Ahora se ha probado que la lengua internacional aprovecha lo mismo para las conversaciones. Por eso el esperanto ha de ser ahora aprendido en todas las ciudades visitables por turistas extranjeros.

Pronto brillará sin nubes el sol del esperanto.

## Bibliografio

**Vollständiges Lehrbuch der Esperanto-Sprache mit Nebungen, Syntax und Proben aus Poesie und Prosa. Nach Prof. Cart. Paris: «L'Esperanto en dix leçons» bearbeitet und erweitert von F. Borel. Esperanto Verlag Moller und Borel. 95, Prinzenstrasse Berlin. M. 1, 20.**

ĝi estas germana Plena lernolibro de la lingvo internacia; ĝi enhavas la alkonformigon de «Esperanto en dek lecionoj» de S.<sup>o</sup> Cart, al kiu oni donis pli vastan amplekson, kaj plie mallongan sintaksan tratktaton kaj kolektan da elektitaj esperantaj tekstoj, versaj kaj prosaj.

Ni ne dubas, do, ke la lernolibro de S.<sup>o</sup> Borel multe kunhelpos al la rapida

## Bibliografía

**Vollständiges Lehrbuch der Esperanto-Sprache mit Nebungen, Syntax und Proben aus Poesie und Prosa. Nach Prof. Cart. Paris: «L'Esperanto en dix leçons» bearbeitet un erweitert von F. Borel. Esperanto Verlag Moller und Borel, 95, Prinzenstrasse, Berlin. M. 1, 20.**

Es un «Manual completo» de la lengua internacional escrito en alemán. Contiene la adaptación de «El Esperanto en diez lecciones» del Sr. Cart, á la que se ha dado mayor extensión, y además un breve tratado de sintaxis y una colección de textos escogidos de esperanto en prosa y verso. La adaptación está hecha con suma habilidad, y la obra pertenece á la colección aprobada por el Dr. Zamenhof.

No dudamos, pues, que el Manual del Sr. Borel contribuirá poderosamente á la



disvastiĝo de Esperanto kaj meritoj bonan akcepton.

**Vorterbuch Deutsch-Esperanto unter Redaktion von Dr. Samenhof herausgegeben von Hermann Fürgensen und M. Pagnier. Berlin, Esperanto Verlag Moller & Borel 2 M. 2.**

Tiu ĉi *Vortaro Germana-Esperanta* meritas ĉiuspecajn laŭdojn. Pri ĝia valoro nenion ni bezonas diri ĉar ĝi estis elfarita sub redaktado de D.<sup>o</sup> Zamenhof: ĝi havas la ĉefan eon kium oni povas postuli de tiaspcaj verkoj, nome, ĝi estas sufiĉe vastampleksa: ĝi enhavas ĉirkaŭ 13,000 vortojn. Ni opinias, ke ĝi rapide disvendigos kaj le publiko scios rekompenci la malfacilan kaj meritplenan laboradon de la aŭtoroj. Niaj germanaj samideanoj havas jam la necesajn rimedojn por rapida kaj efika propagando: *bonan* lernolibron kaj *bonegan* vortaron. Baldaŭ ni konstatos la grandajn progresojn faritajn de Esperanto en Germanujo.

Niaflanke, ni gratulas la aŭtorojn de tiuj du verkoj kaj al ili deziras plej plenan sukceson.

*Nuna stato de esperanto en la mondo (raporto de la esplora komiso de la Liona esperantista grupo)*, teksto esperanto de S.<sup>o</sup> A. Offret. Aĉetebla ĉe la sekretario de la grupo, 53, chemin des Pins. Prezo: 0 fr. 15.

Por la pogranda aĉeto oni povas adresi la mendajojn al S.<sup>o</sup> Jean Patricot, direktoro de la komerca servado de la Liona esperantista grupo, 22, rue de la République, Lyon.

*Bulletin du Musée océanographique de Monaco. Scienca krovado de la ŝipo «Princese Alice» en 1903.* Franca teksto kaj esperanta resumo de D.<sup>o</sup> J. Richard. Prezo: 1 fr.

32 paĝa broŝureto tre interesa pro la alportitaj sciencaj eltrovaĵoj. La rezumo en lingvo internacia de D.<sup>o</sup> Richard estas leginda pro sia korekta kaj klareco.

difusión rápida del Esperanto y merecerá una buena acogida.

**Vorterbuch Deutsch-Esperanto unter Redaktion von Dr. Samenhof herausgegeben von Hermann Fürgensen und M. Pagnier. Berlin, Esperanto Verlag Moller & Borel 2 M. 2.**

Este *Diccionario Alemán-Esperanto* merece toda clase de elogios. De su valor nada necesitamos decir, porque ha sido compuesto bajo la dirección del Dr. Zamenhof. Reune la cualidad principal que puede exigirse a esta clase de obras, es decir, es suficientemente extenso. Contiene unas 13.000 palabras. Creemos que se venderá rápidamente, y que el público sabrá recompensar la difícil y meritoria labor de los autores. Nuestros compañeros alemanes tienen ya los elementos necesarios para una propaganda eficaz y rápida: un *buen Manual* y un *excelente Diccionario*. Pronto veremos los grandes progresos que la lengua internacional hará en Alemania.

Por nuestra parte felicitamos a los autores de estas dos obras y les deseamos el éxito más completo.

*Estado actual del Esperanto en el mundo (informe de la comisión investigadora del grupo esperantista de Lion)*—texto en esperanto, por Mr. A. Offret. De venta, en la Secretaría del grupo, 53, chemin des Pins. Precio: 0 fr. 15.

Para la compra en grandes cantidades pueden dirigirse los pedidos al Sr. Jean Patricot, director del servicio comercial del grupo esperantista de Lion, 22, rue de la République, Lion.

*Boletín del museo oceanográfico de Mónaco. Excursión científica del yacht «Princese Alice» en 1903.* Texto francés y resumen en esperanto por el Dr. J. Richard. Precio: 1 fr.

Folleto de 32 páginas muy interesante por los datos científicos que consigna. El resumen en lengua internacional del Dr. Richard merece leerse por su corrección y claridad.



## Sciigoj

*Nekrologio.* Ni sincere bedaŭras la mortojn de la esperantistoj; S.<sup>o</sup> Xavier Dorion, prezidanto de la grupo de Roubaix (Francujo), S.<sup>o</sup> Gaston Moretti, membro de tiu de Nancy kaj de la Franca Societo por propagando de esperanto, kaj S.<sup>o</sup> L. Michels, kanoniko, honora prezidanto de la grupo esperantista de Melano (Belgujo).

Al siaj familioj ni prezentas nian sinceran kondolencon.

**Alĝero.**—La propagando de esperanto daŭrigas kun granda aktiveco. Kapitano Capé, profitante deĵoran ekskurson; faris bonegan serion da paroladoj en Dellys, Camp-du-Marchal, Rebeval, Medea, Blida, Miliana, Boghari, Boghar, k. c. Sekve de tia efika propagando pli ol du mil personoj eksciis pri esperanto kaj granda intereso elvekiĝis inter la francoj, hispanoj kaj italoj loĝantaj en tiu afrika regiono kaj oni organizis kelkajn esperantajn kursojn. La grupo esperantista kunkalkulis la 12.<sup>an</sup> de majo 450 membrojn.

*L'Union latine* de la unua de majo enhavas bonegajn propagandajn artikolojn hispane kaj itale verkitajn, kiujn ni ŝaldas al niaj entuziasmaj amikoj S.<sup>oj</sup> Codorniu, P. Guinart kaj grafo A. Gallois.

**Anglujo.**—*The Esperantist* (junio) enhavas multon da vere interesaj tekstoj literaturaj kaj raportas pri la fondiĝo de grupo esperantista ĉe Battersea, kies sekretario estas S.<sup>o</sup> A. T. Lee, 2, Cupar Road, Battersea, S. W.

**Belgujo.**—*La Belga Sonorilo* (majo) aliĝas al la protesto formulita de S.<sup>o</sup> de Beaufront, kiun ni publikigis en nia lasta numero kaj ĝi enhavas, inter aliaj tekstoj kaj propagandaj sciigoj, artikolon pri sakludado, en kiu oni prezentas la irojn

## Noticias

*Nekrologia.* Lamentamos sinceramente la muerte de los Esperantistas señor Xavier Dorion, presidente del grupo de Roubaix (Francia), Sr. Gaston Moretti, miembro del de Nancy y de la Sociedad Francesa para propagación del Esperanto, y Sr. Michels, Canónigo, presidente honorario del grupo esperantista de Malinas (Bélgica).

Presentamos á sus familias nuestro más sincero pésame.

**Argel.**—La propaganda del Esperanto continúa con gran actividad. El Capitán Capé aprovechando una excursión por asuntos del servicio, ha dado una magnífica serie de conferencias en Dellys, Camp-du-Marchal, Rebeval, Medea, Blida, Miliana, Boghari, Boghar, etc. A consecuencia de tan eficaz propaganda más de dos mil personas han oído hablar del Esperanto, se ha despertado gran interés entre los franceses, españoles é italianos, que residen en aquella región africana, y se han organizado algunos cursos de Esperanto. El grupo esperantista en 12 de Mayo contaba ya 450 miembros.

*L'Union latine* del 1.<sup>o</sup> de Mayo contiene excelentes artículos de propaganda en español é italiano que debemos á nuestros entusiastas amigos Sres. Codorniu, P. Guinart y Conde A. Gallois.

**Inglaterra.**—*The Esperantist* (Junio), contiene multitud de textos literarios, verdaderamente interesantes, y da cuenta de la fundación de un grupo esperantista en Battersea, cuyo Secretario es el Sr. A. T. Lee, 2, Cupar Road, Battersea, S. W.

**Bélgica.**—*La Belga Sonorilo* (Mayo), se adhiere á la protesta formulada por el Sr. de Beaufront que publicamos en nuestro último número: y contiene entre otros textos y noticias de propaganda, un artículo dedicado al ajedrez en que se



de ludo, korespondade farita, inter la esperantistoj S.<sup>o</sup> Edward Metcalfe, el Lancaster (Anglujo) kaj Leopoldo Jamin, el Antverpeno (Belgujo) kaj kies venkinto estis la unua.

**Bulgarujo.**—Ni ricevis la du unuajn numerojn de la nova gazeto bulgara *Trumpetisto*, kies celo estas la propagando de la lingvo internacia.

Tiun ĉi gazeton oni dissendas senpage kaj ĝi publikigas per la rimedoj ricevitaj de monoferoj memvole faritaj de la esperantistoj, kiuj deziras kunhelpi al tiu celo.

Ni deziras longan kaj prosperan vivadon al la nova kolego kaj ke la esperantistoj aldifinu al ĝi sian efikan subtenon.

«Plevna esperantista grupo» organizas esperantan ekspozicion kaj afable petas al la samideanoj, el ĉiuj landoj, ke ili bonvolu sendi poŝtkartojn, leterojn, k. t. p. al S.<sup>o</sup> Sekretario K. K. Avramov, Plevno, (Bulgarujo).

**Ĉilio.**—Ni ricevis la 4.<sup>an</sup> numeron de *Ĉilio esperantista*, kiu enhavas daŭrigon de la esperanta gramatiko, ekzercojn kaj aliajn interesajn tekstojn.

La «Ĉilia Societo esperantista» honoris nin per la sendo de sia regularo, kiu konsistas el 56 paragrafojn tre bone pensitajn.

**Francujo.**—En Provins fondiĝis la 12.<sup>an</sup> de aprilo esperantista grupo: jen ĝia estraro: prezidanto: S.<sup>o</sup> Scheveitzer-Hugo; vicprezidanto: S.<sup>o</sup> Collin; sekretario: S.<sup>o</sup> Cognier; kasisto: S.<sup>o</sup> Laconture; bibliotekistino: F.<sup>ino</sup> Vernant.

Sekve de bonega parolado farita la 17.<sup>an</sup> de aprilo de S.<sup>o</sup> Samuel Meyer en la Rochelle, ĵus fondiĝis grupo esperantista, kies provizora estraro estas la jena. prezidanto: S.<sup>o</sup> S. Meyer; kasisto: S.<sup>o</sup> A. Miaux, 8 rue de l'Escale, kaj sekretario: S.<sup>o</sup> A. Besnard, 9, rue Amelot.

En Nancy-o, la bela ĉefurbo de Loreno, okazos de l' 18<sup>a</sup> ĝis la 25<sup>a</sup> de

includen los movimientos de una partida jugada por correspondencia entre los Esperantistas Sres. Eduardo Metcalfe, de Lancaster (Inglaterra) y Leopoldo Jamin, de Amberes (Bélgica) que fué ganada por el primero.

**Bulgaria.**—Hemos recibido los dos primeros números de la nueva revista búlgara *Trumpetisto*, cuyo objeto es la propaganda de la lengua internacional.

Este periódico se reparte gratuitamente y se publica con los recursos obtenidos por suscripción voluntaria de los Esperantistas que desean contribuir á este fin.

Deseamos vida larga y próspera al nuevo colega y que los Esperantistas le presten siempre su eficaz ayuda.

El grupo esperantista de Plevna organiza una exposición esperanta y afablemente ruega á los compañeros de todos los países que envíen tarjetas postales, cartas, etc., al Secretario K. K. Avramov, Plevna (Bulgaria).

**Chile.**—Hemos recibido el número 4 de *Cilio Esperantista*, que contiene la continuación de la gramática esperanta, ejercicios y otros textos interesantes.

La «Sociedad Esperantista de Chile» nos ha honrado con el envío de su reglamento, que consiste en 56 artículos muy bien pensados.

**Francia.**—En Provins se fundó el 12 de Abril un grupo esperantista: he aquí su junta directiva: presidente: señor Schweitzer-Hugo; vicepresidente: señor Collin; secretario: Sr. Cognier; cajero: Sr. Laconture; bibliotecaria: Srta. Vernant.

A consecuencia de una excelente conferencia dada el 17 de Abril en La Rochelle por el Sr. Samuel Meyer, acaba de fundarse un grupo esperantista, cuya junta directiva provisional es la que sigue: presidente: Sr. S. Meyer; cajero: señor A. Miaux, 8, rue de l'Escale, y secretario, Sr. A. Besnard, 9, rue Amelot.

En Nancy, la bella capital de la Lorena, tendrán lugar del 15 al 25 del próxi-



la proksima Julia monata, fotografa kongreso.

La Nancy-a grupo invitas al ĉiuj esperantistoj.

Por pliaj sciigoj, sin turnu al S.<sup>o</sup> Frécot, kasisto de la dirita grupo: «35, rue Sainte-Catherine, Nancy (France).»

Jus eliris la unua numero de *Esperanta Ligilo*, monata esperanta gazeto presita laŭ sistemo Braille'a por blinduloj, kies celo ne povas esti plifumana. Interkomunikigi ĉiujn blindulojn konantajn esperanton per revuo raportanta al ili la progresojn de la internacia lingvo, estas sendube entrepreno tute laŭdinda; ĝia noblo iniciatoro kaj administranto-direktoro de la gazeto estas, kiel oni povas tre bone antaŭpensi, la eminenta profesoro S.<sup>o</sup> Th. Cart.

La abono kostas 3 frankojn (dum la tuta jaro 1904) kaj la mendojn oni povas adresi al la direktoro (12, rue Sonfiot, Paris) aŭ al tiu de LA SUNO HISPANA..

La novan gazeton ni rekomendas al niaj legantoj kaj deziras ke ĉiuj esperantistoj kunhelpu plej interese al tio, ke ĝi atingu sukceson tiel brilan kiel merititan.

Ni ricevis la duan numeron de *Revuo Universala*, memstara organon, kiu publikigas sub direkto de S.<sup>o</sup> Emile Gasse (71, rue Michelet, Havro. Francujo).

Tiu nova revuo publikigas nur en esperanto kaj ĝiaj enhavataj tekstoj estas diversaj kaj interesaj. Al ĝi ni deziras prosperadon kaj longan vivon. La abonojn oni povas mendi al la direktoro. Kosto: 4 frankoj jare (por Rusujo, 5).

**Germanujo.**—La lasta numeron (majo) de *Esperantistische Mitteilungen* enhavas mallongan deklaron per kiu ĝi montras sin partiano de la priesperantaj principoj kaj reguloj de D.<sup>o</sup> Zamenhof kaj protestas kontraŭ ĉiuspecaj reformoj. Ĝi raportas pri la lasta kunsido (la 5.<sup>an</sup> de

mo mes de Julio un kongreso de fotografa.

El grupo de Nancy invita á todos los esperantistas.

Para más noticias dirigirse al Sr. Frécot, cajero de dicho grupo: «rue Sainte-Catherine, Nancy, France.»

Acaba de salir el primer número de *Esperanta Ligilo*, revista mensual esperanta en escritura Braille para ciegos, cuyo objeto no puede ser más humanitario. Poner en relación los ciegos de todos los países que conocen el esperanto, por medio de una revista que les dé cuenta de los progresos de la lengua internacional, es sin duda empresa digna de todo elogio. Su noble iniciador y director-administrador de la revista es, como puede muy bien suponerse, el eminente profesor Sr. Th. Cart.

La suscripción cuesta 3 francos (por todo el año 1904) y los pedidos pueden dirigirse al director (12, rue Sonffot, Paris) ó al de LA SUNO HISPANA.

Recomendamos la nueva revista á nuestros lectores, y deseamos que todos los esperantistas contribuyan con el mayor interés á que alcance un éxito tan merecido como brillante.

Hemos recibido el núm. 2 de *Revuo Universala*, órgano independiente que se publica bajo la dirección del Sr. Emile Gasse (71, rue Michelet, Le Havre. Francia).

Esta nueva revista se publica solamente en esperanto y los textos que contiene son variados é interesantes. Deseámosle prosperidad y larga vida. Las suscripciones pueden encargarse al director; importe, por año, 4 francos (para Rusia, 5).

**Alemania.**—El último número (Majo) de *Esperantistische Mitteilungen* contiene una breve declaración en que se manifiesta partidario de los principios y reglas del Dr. Zamenhof relativas al Esperanto y protesta contra toda clase de reformas. Da cuenta de la última sesión (5 de Mayo)



majo, de la grupo esperantista Berlina kaj publikigas la sekvantan *alvokon*, kiun ni tre volonte reproduktas:

«Nia grupo organizas esperantan ekspozicion en Berlino; ni estos do tre dankaj al ĉiuj amikoj de nia afero, kiuj bonvolos helpi nin sendante ĉiuspecajn esperantaĵojn: propagandiloj, cirkuletojn, presaĵojn en diversaj lingvojn kaj poŝtkartojn de landoj, kie esperanto ne estas ankoraŭ tre disvastigita. Oni bonvolu adresi la sendojn al S.<sup>o</sup> H. Jürgensen, grupa sekretario, Bandelstrasse, 16, Berlino N. W.»

La ŝatinda gazeto germana enpresas plie la kronikon naciajn, en kiu oni raportas pri la apero de nova revuo *Munĥena Esperantisto* (Abonkosto: Mk. 1,50. Sin turnu al S.<sup>o</sup> E. Meyer, Rumfordstrasse, 25, Munĥeno) bibliografion, nunan staton de esperanto k. t. p.

**Meksiko.**—Esperanto rapide progresas en tiu amerika lando. *La Meksika Lumturo* ke de numero al numero, pli grandigas je graveco kaj intereso, enpresas en tiu de marto-aprilo, ekstrakton de la aktoj de la Meksika Societo, la leteron de doktoro Zamenhof adscritan al sinjoro Seynaeve, fabulon de La Fontaine verse tradukitan en esperanto, la programon de Delegacio por alprenado de lingvo internacia, interesan bibliografion, k. t. p.

Fine nia estimata kolego raportas en la kroniko pri infana festo organizita la 30.<sup>an</sup> de lasta aprilo, de la geprofesoroj de la oficialaj lernejoj, de Sankta Rozo por esperanto disvastigo.

**Peruo.**—La marta numero de *Antaŭen Esperantistoj!!* enpresas la leteron de D.<sup>o</sup> Zamenhof adresitan al S.<sup>o</sup> Seynaeve kaj inter aliaj interesaj tekstoj enhavas la pruvon de la Fermat'a teoremo, kies tradukon ni ŝuldas al S.<sup>o</sup> R. Bricard kaj oni publikigis en *Novvelles Annales de Mathematiques* (aŭgusto, 1903).

del grupo esperantista de Berlín y publica la siguiente *invitación* que reproducimos con mucho gusto:

«Nuestro grupo organiza una exposición esperantista en Berlín: quedaremos muy agradecidos á todos los amigos de nuestra causa que tengan la bondad de ayudarnos con el envío de toda clase de publicaciones en esperanto: folletos de propaganda, circulares, impresos en diversas lenguas y tarjetas postales de países en que el Esperanto no esté muy difundido. Rúégase la dirección de los envíos al Sr. H. Jürgensen, secretario del grupo, Bandelstrasse, 16, Berlín. N. W.»

La apreciable revista alemana inserta además la crónica nacional en que se da cuenta de la aparición de una nueva revista *Munĥena Esperantisto* (precio de la suscripción: Mk. 1'50. Dirigirse al señor E. Meyer, Rumfordstrasse, 25, Munich), bibliografía, estado actual del Esperanto, etcétera.

**Méjico.**—El esperanto prospera rápidamente en este país americano. *La Meksika Lumturo*, que de número en número va adquiriendo mayor importancia é interés, inserta en el marzo-abril el extracto de las actas de la Sociedad Mejicana, la carta del Dr. Zamenhof dirigida al Sr. Seynaeve, una fábula de la Fontaine traducida al Esperanto en verso, el programa de la Delegación para la adopción de una lengua internacional, una interesante bibliografía, etc.

Finalmente nuestro estimado colega da cuenta en la crónica de una fiesta infantil organizada el 30 de abril último por los profesores de las Escuelas oficiales de Santa Rosa, para difusión del Esperanto.

**Perú.**—El número de marzo de *Antaŭen Esperantistoj!!* inserta la carta del Dr. Zamenhof dirigida al Sr. Seynaeve, y entre otros textos interesantes contiene la demostración del teorema de Fermat, cuya traducción esperanta es debida á Mr. Bricard y se publicó en *Novvelles Annales de Mathematiques* (agosto 1903).



**Svisujo.**—La librejo Eggimann, el Genevo, prezentas al la publiko en sia elmontra fenestro ekspozicion de poŝtkartoj, libroj, k. c., esperantaj.

**Hispanujo.**—*Manreso.* Esperanto tie progresas rapide, dank'al la senĉesaj klopodoj de niaj amikoj. Laŭ raportas la *Revuo de la laborista Ateneo* de lasta monato, la unuan de majo oni fondis grupon esperantistan, kies estraro estis elektata jenmaniere:

Honora prezidanto: D.º L. Zamenhof.

Prezidanto: S.º N. Masvidal y Puig.

Vicprezidanto: S.º Gabriel Torras.

Sekretario: S.º Eduardo Segarra.

Vicsekretario: S.º Julio Devant.

Kasisto: S.º Vicente Lasalle.

Bibliotekisto: S.º Salvador Gorgas.

1.ª voĉdonanto: S.º A. Jané Vila.

2.ª voĉdonanto: S.º Miguel Cura.

Ĉe la kunveno de la membroj de la grupo oni decidis kore saluti ĉiujn esperantistoj kaj aliĝi al la Hispana Societo por propagando de esperanto.

Ankaŭ raportas la nomita revuo pri la vizito, kiun la Manresa esperantista S.º Cura faris ĉe Valencio al P. Guinart kaj S.º Jimenez Loira.

Niaj samideanoj Valenciaj penegis komplezi la amindan vizitanton, akompanante lin tra la *urbo de la floroj* kaj montrante al li ĝiajn plej meritajn mirindaĵojn.

Ĉe S.º Jimenez Loira, ĉi tiu prezentis belan kaj diversan kolekton da esperantaj poŝtkartoj, inter kiuj montriĝis aŭtografiaĵoj de D.º Zamenhof kaj aliaj eminentuloj, kaj aŭdajon fonografan en lingvo internacia, kiu permesis taksu kaj kompreni sen ia malfacilaĵo la paroladon de esperantistoj anglaj, francaj, k. t. p.

*Albarracín (Teruel).*—Dank'al la aktiva laborado de la R. P. Agut de la Piaĵ Lernejoj, la 8.ª de majo fondiĝis en Albarracín grupo esperantista, kies estraro estas la jena:

Honora prezidanto: D.º L. Zamenhof.

Prezidanto: P. Vicente Agut.

**Suiza.**—La librería Eggimann, de Ginebra, presenta al público en su escaparate una colección de tarjetas, libros, etc., relativas al Esperanto.

**España.**—*Manresa.* El esperanto progresa rápidamente allí, gracias á los continuos desvelos de nuestros amigos. Según refiere la *Revista del Ateneo Obrero* del mes pasado, el día 1.º de mayo se fundó un grupo esperantista, cuya junta directiva fué elegida como sigue:

Presidente de honor: Dr. L. Zamenhof.

Presidente: D. N. Masvidal y Puig.

Vicepresidente: D. Gabriel Torras.

Secretario: D. Eduardo Segarra.

Vicesecretario: D. Julio Devant.

Tesorero: D. Vicente Lasalle.

Bibliotecario: D. Salvador Gorgas.

Vocal 1.º: D. A. Jané Vila.

» 2.º: D. Miguel Cura.

En la reunión celebrada por los miembros del grupo se acordó saludar cordialmente á todos los esperantistas, y adherirse á la Sociedad Española para propagación del esperanto.

También da cuenta la mencionada revista de la visita que el esperantista manresano Sr. Cura hizo en Valencia al reverendo P. Guinart y Sr. Jiménez Loira.

Nuestros *samideanos* valencianos afanáronse por complacer al amable visitante, acompañándole por la *ciudad de las flores* y enseñándole sus más precia-das maravillas.

En casa del Sr. Jiménez Loira, éste presentó una hermosa y variada colección de tarjetas postales esperantistas, entre las que figuraban autógrafos del Dr. Zamenhof y otras eminencias, y una audición fonográfica en lengua internacional que permitió apreciar y comprender sin dificultad alguna el habla de esperantistas ingleses, franceses, etc.

*Albarracín (Teruel).*—Gracias á la activa labor del Rdo. P. Agut, de las Escuelas Pías, el día 8 de mayo se constituyó en Albarracín un grupo esperantista, cuya junta directiva es la siguiente:

Presidente honorario: Dr. L. Zamenhof.

Presidente: Rev. P. Vicente Agut.



Vicprezidanto: S.<sup>o</sup> L. Antonio, notario.

Sekretario kaj bibliotekisto: S.<sup>o</sup> Joaquín Sanchez.

Kasisto: S.<sup>o</sup> José M.<sup>a</sup> Lozano, kanoniko.

Voĉdonantoj: S.<sup>o</sup> Dionisio Navarro y S.<sup>o</sup> Manuel Valero.

Post la fondiĝo de la grupo, oni decidis malfermi senpagan esperantan kurson komisiitan al R. P. Agut, kaj kiun lernas ĉiuj membroj.

Ni kore gratulas tiel distingindan esperantiston kaj ni deziras al tiu grupo kaj al la Manresa, multajn jarojn de prospera vivado.

*Alicante.* — La *Correspondencia de Alicante* de la 23.<sup>a</sup> de majo enpresas artikolon pri la lingvo internacia, en kiu oni prezentas la bonegajn ecojn de esperanto kaj la lastajn de ĝi faritajn progresojn. Samtempe oni elmontras mallongajn konsiderojn pri la ekstrema facileco de ĝiaj gramatiko kaj vortaro kaj oni certigas, ke la levado de esperanto estas nun de nediskutebla praktika utileco.

*Gallarta (Vizcaya).* — Ni ricevis longan leteron de nia amiko S.<sup>o</sup> Rufino Unzaga, en kiu li raportas al ni pri la tiea esperanta movado. Kiel ĉie, estas tie multenombraj la skeptikuloj kaj S.<sup>o</sup> Unzaga trovis grandajn barilojn en la efika propagando de esperanto. Por konvinki iujn pri tio, ke la lingvo internacia estas ne utopio, sed perfekte efektivigebla ideo, li hispanen tradukis la bonegan artikolon enpresitan en *Fundamenta Krestomatio* sub la titolo: «Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia» kaj publikigis ĉi tiun tradukon kune kun priesperanta studo, montranta la ĝiajn progresojn kaj eminentulojn, kiuj ĝin aprobis. La rezultato estis plene kontentiga, ĉar kelkaj personoj kleraj aliĝis al nia afero kaj esperanto jam estas favore akceptite en Gallarta kiel multtegrava progreso.

Vicepresidente: Sr. D. L. Antonio, notario.

Secretario y bibliotecario: Sr. D. Joaquín Sánchez.

Tesorero: Sr. D. José M.<sup>a</sup> Lozano, canónigo.

Vocales: Sr. D. Dionisio Navarro y Manuel y Sr. D. Manuel Valero.

Después de la constitución del grupo se acordó abrir un curso gratuito de esperanto á cargo del P. Agut y al que asisten todos los miembros.

Felicitamos cordialmente á tan distinguido esperantista y deseamos á este grupo y al de Manresa muchos años de próspera vida.

*Alicante.* — La *Correspondencia de Alicante* de 23 de mayo inserta un artículo relativo á la lengua internacional, en que se indican las excelentes cualidades del esperanto y progresos que últimamente ha realizado. Al propio tiempo se exponen breves consideraciones sobre la facilidad extrema de su gramática y diccionario, y se asegura que el estudio del esperanto es actualmente de utilidad práctica indiscutible.

*Gallarta (Vizcaya).* — Hemos recibido una larga carta de nuestro amigo señor D. Rufino Unzaga en que nos da cuenta del movimiento esperantista en dicha población. Como en todas partes, los escépticos abundan allí y el Sr. Unzaga ha encontrado grandes obstáculos para propagar eficazmente el Esperanto. Para convencer á algunos de que la lengua internacional no es una utopía, sino una idea perfectamente realizable, ha traducido al español el magnífico artículo que figura en la *Crestomatia fundamental* con el título de «Esencia y porvenir de la idea de una lengua internacional» y ha publicado esta traducción en unión de un estudio relativo al Esperanto en que se indican sus progresos y eminencias que lo han aprobado, como solución perfecta de la lengua universal. El resultado ha sido completamente satisfactorio, porque algunas personas instruídas se han adherido á nuestra idea y ya el Esperanto en Gallarta es acogido favorablemente como progreso de importancia suma.



Sinjoron Unzaga ni gratulas kaj konfidas, ke baldaŭ ni havos novan esperantistan grupon en Gallarta.

Felicitemos al Sr. Unzaga y confiamos en que pronto tendremos un nuevo grupo esperantista en Gallarta.

## Malplena lulilo

Alvenis l' anĝeloj,  
kisadis l' infanon,  
kaj kantante ĝin diris mallaŭte:  
«Vi venu kunfrato».

Ĝi vidis l' anĝelojn  
ĉe sia lulilo,  
kaj levante la brakoj ĝi diris:  
«Kun vi mi tuj iros».

Eksbatis l' anĝeloj  
flugilojn oritajn  
enpreninte l' infanon en brakoj  
kaj ĉiuj deiras.

De pala tagruĝo  
la lumo ĉarmega  
la sekvantan matenon lumigis  
lulilon malplenan!

*Tradukis: R. Codorniu.*

## La cuna vacía

Bajaron los ángeles,  
besaron su rostro  
y cantando á su oído dijeron:  
«Vente con nosotros».

Vió el niño á los ángeles  
de su cuna en torno,  
y agitando los brazos les dijo:  
«Me voy con vosotros».

Batieron los ángeles  
sus alas de oro,  
suspendieron al niño en sus brazos  
y se fueron todos.

De la aurora pálida  
la luz fugitiva,  
alumbró á la mañana siguiente  
la cuna vacía!

*José Selgas.*

## RAKONTO

Hino eniris butikon, en Bruselo, kaj montrante bareleton da haringoj li demandis kion tio estas.

—Tio, estas peklitaj haringoj — oni respondis.

—Kial oni peklas tiujn haringojn? — li demandis.

—Por ke ili konserviĝu longe.

Kiam la nino eliris el la butikon, li diris tre aminde: «Mi deziras, ke oni vin ĉiujn metu en peklon!»

*El «De Lusthof» tradukis L. Cogen.*

## CUENTO

Un chino entró en una tienda en Bruselas, y señalando á un barrilito de arenques, preguntó qué era aquello.

—Esos son arenques salados—le contestaron.

—¿Por qué se salan los arenques? — preguntó.

—Para que se conserven largo tiempo.

Cuando el chino salió de la tienda, dijo con mucha amabilidad: «Deseo que á todos ustedes los pongan en sal.»



## Anekdoto

Instruisto proponas al sia lernanto problemon por solvado.

—Mi pruntas al via patro kvindek pesetojn, kondiĉe ke li redonos al mi dudek pesetojn post unu monato.

Kiom li ŝuldos al mi tiam?

—Kvindek pesetojn,

—Rimarku bone, ke post unu monato li redonos al mi dudek pesetojn, kaj ke al li mi pruntas kvindek.

Sekve, post unu monato, li al mi nur ŝuldos...

—Kvindek pesetojn.

—Vi eraras; vi *tre malbone* konas Aritmetikon...

—Sed mi *tre bone* konas mian patron!...

Tradukis: *Manuel Benavente* (Esp.<sup>o</sup> 6.722).

## Anécdota

Un profesor propuso á su discípulo un problema para resolver.

—Yo presto á su padre de usted cincuenta pesetas á condición de que él me devuelva veinte pesetas después de un mes. ¿Cuánto me deberá entonces?

—Cincuenta pesetas.

—Fíjese usted bien en que después de un mes me devolverá veinte pesetas y que le presté cincuenta.

—Luego pasado un mes solamente me deberá...

—Cincuenta pesetas.

—Se equivoca usted; conoce usted *muy mal* la aritmética...

—Pero conozco *muy bien* á mi padre!...

## La vulpo kaj la katoj

Vulpo pasis iam tra korto en kiu estis pluvakvujo enhavanta malmulte da akvo: ĝian fundon rigardante ĝi vidis en ĝi multajn fiŝojn; incitata de ĝia manĝegemo kaj inspirata de sia ruzeco, ĝi sin ĵetis sur kuvon pendantan de ĉeno kaj per sia pezo facile malsupreniris en la pluvakvuĵon, samtempe ke altiĝis alia kuvo kunligita je la dua ekstremaĵo de la ĉeno.

Manĝinte tiom da fiŝoj kiom ĝi deziris, la vulpo decidis elŝiri el la akvujo, sed ĝiaj penoj por la supreniro restis vanaj kaj senefikaj.

Kiam ĝi senespere ploris sian malfeliĉon, katblekoj eldistris ĝin el ĝia ĉagreno.

Ekvidinte savrimedon, la vulpo ekparolis flate kaj aminde:

—Karaj amikoj: ĉu vi estas gekatoj? Estu feliĉaj je viaj amoj. Mi estas fiŝo tiel

## La zorra y los gatos

Una zorra pasaba una vez por un patio en que había una cisterna que tenía poca agua: mirando al fondo vió en ella muchos peces; incitada por su hambre é inspirada por su astucia, se abalanzó al cubo pendiente de la cadena y por su peso fácilmente descendió en la cisterna, al mismo tiempo que elevaba el otro cubo pendiente del otro extremo de la cadena.

Habiendo comido tantos peces como quiso, decidió salir del depósito de agua, pero sus esfuerzos para subir resultaron vanos é ineficaces.

Cuando sin esperanza lloraba su desdicha, maullidos de gatos la distrajeran de su pena.

Ocurriéndosele un remedio salvador, la zorra dijo lisonjera y amablemente:

—Queridos amigos: ¿sois gato y gata? Sed felices en vuestros amores. Yo soy



amanta vian genton, ke mi estas preta tuj oferi mian vivon kaj ankaŭ tiun de miaj kunvivantaj kamaradoj por via felica. Eksaltu, do, en la kuvon kiun vi vidas super mi, kaj tuj vi alvenos en festenejon, kie vi eterne ĝuos la feliĉaĵojn de geedza vivo.

La kato diris:—Mi estas maljuna kato kaj malmulte ŝatas la danĝerajn aventurojn: post pripensado, mi....

—Malkuraĝulo! blekrespondis ĝia *Evo*, kaj ambaŭ saltis en la kuvon kaj reciproke ĉirkaŭprenitaj malsupreniris en la profundeĝaĵon, tiel kiel defalis niaj unuaj gepatroj.

Samtempe la ruza vulpo saltis sur la malsupran kuvon, eliris el la pluvakvujo kaj ankoraŭ vivas dank'al la katoj simplanimaj....

A. J. L.

un pez tan amante de vuestra casta, que estoy dispuesto á ofrecer inmediatamente mi vida y también las de mis convivientes camaradas por vuestra felicidad. Saltad, pues, en el cubo que veis sobre mí, y enseguida llegaréis al lugar del festín, en el que eternamente gozaréis las felicidades de la vida matrimonial.

El gato dijo:—Yo soy gato viejo y poco aficionado á las aventuras peligrosas; después de reflexionar, yo....

—¡Cobarde!—maulló su *Eva*, y ambos saltaron al cubo y abrazados bajaron al abismo lo mismo que cayeron nuestros primeros padres.

Al propio tiempo la astuta zorra saltaba al cubo de abajo, salía de la cisterna y vive aún gracias á los gatos tontos....

## Amuzajoj

VIII. Oni metu literon sur ĉiun ciferon kaj oni legu horizontale la jenon.

1	vokalo
54	sufikso
345	prepozicio
2136	orda nombro
186	adjektiva sufikso
79	konsonanto
14356789	alnomo elpensinto jamkonata.

IX. Du pronomoj kaj unu vokala litero kunmetas flornomon.

X

sufikso
vokala litero

L. S. B.



## Korespondada fako de "La Suno Hispana,"

### SINJOROJ:

- Ĵ. V. Ll. Villanueva y Geltrú (Hispanujo)*—Mi ricevis 1,50 pesetojn kaj sendis al vi vian mendaĵon.
- Ĵ. C. Duffel (Belgujo)*—Laŭ via deziro, mi daŭrigos la sendon de L. S. H. al S.º V.
- G. G. Dijono (Francujo)*—Pro miaj multaj okupaĵoj mi ne povas korespondadi kun vi, Sed mi anoncas vian deziron en tiu ĉi numero de nia gazeto.
- E. S. Manresa (Hispanujo)*—Mi sendis al vi vian mendaĵon kaj respondis al ĝentila poŝtkarto de via grupo.
- S. S. B. Murcia (Hispanujo)*—Ricevita kaj dankita via sendo. Vi ne forgesu, mi petas, vian promeson,
- A. T. Bruxelles (Belgujo)*—Mi volonte plenumas vian deziron, sendante al vi tiun ĉi numeron de L. S. H.
- A. M. Nogales (Meksikujo)*—Ricevitaj via ĝentila poŝtkarto kaj via sendo. Dankon.
- G. K. D. Saratov (Rusujo)*—Mi sendis al vi kolekton da numeroj elirintaj de M. L. kaj avizan poŝtkartan.
- V. T. Elbeuf (Francujo)*—Mi ricevis kaj dankas al vi, vian belan poŝtkarton. Mi tre bedaŭras ke miaj multaj okupaĵoj ne lasas al mi tempon liberan por amuza korespondado.
- D. R. P. Arezzo (Italujo)*—Mi ricevis vian belan ilustritan poŝtkarton, kiun mi tre dankas. Miaj multaj okupaĵoj ne lasas al mi tempon liberon por amuza korespondado. Pardonu.
- F. R. Sevilla*—Recibí su envío. Le mandé el núm. 8.

**Kore salutas Vin,**

*A. Ĵ. L.*

---

Tipografia Moderna, á cargo de Miguel Gimeno, Avellanas, 11.—Valencia

---

*Sinjoro O. Simon á Jancourt par Bar-sur-Aube, Aube (Francujo)*—Deziras interŝanĝi leterojn aŭ poŝtkartojn ilustritajn. Li ĉiam tuj respondos.

---

*Sinjoro Gabriel Guillot, 4 rne Berlier, Dijon, Côte d'or (Francujo)*—Deziras korespondadi kun hispanaj geesperantistoj.

---



La Administracio de LA SUNO HISPANA volonte donos al niaj abonantoj ĉiujn sciigojn kaj plenumos ĉiujn mendojn, petitajn de ili. Oni nur bonvolu sendi por la respondo poŝtmarkon el ia ajn lando ekvivalentan je 0,25 frankoj.

### EL BIBLIOTECARIO DEL GRUPO ESPERANTISTA DE MURCIA—Sociedad, 14

Se encarga de hacer la suscripción á cualquiera revista de Esperanto de las que se publican en la actualidad, como igualmente de proporcionar cualquiera de las obras de Esperanto.

Diccionario Esperanto-Español de raíces, una peseta; Gramática, 0'75; cuadro de palabras correlativas, 0'10; enumeración y significado de los afijos, 0'25; ejercicio de traducción, 0'50. — **Revdo. P. ANTONIO GUINART** — ESCUELAS PIAS — VALENCIA.

La Administración de este periódico admite suscripciones, en valores ó sellos de correo españoles, á los periódicos esperantistas: *Internacia Sciencia Revuo* — *Lingvo Internacia*. — *Societo por internaciaj rilatoj*. — *Literatura Biblioteko de Lingvo Internacia*. — *Rondiranto y La Meksika Lumturo*.

*L'Esperantiste* oficiala revuo de la Societo franca por la propagando de esperanto, 20 paĝoj (formato 15×20) da teksto franca-esperanta kun ok paĝoj de kovrilo, internacia korespondado esperanta, senpage, 3 fr. 50 por unu jaro. 4 fr. kun enskribo en la societon. Turnu vin al *Administration de «L'Esperantiste», Louviers (Eure) France*.

**LONDONO** Pensio por gesinjoroj. Hejmaj komfortaĵoj, bano (varma kaj malvarma). Moderaj prezoj. Oni paroladas kaj korespondadas en esperanto, angla kaj franca lingvoj. **Sinjorino O'CONNOR**, *Esperanto House, St-Stephen's Sq., Bayswater, 10*.

MANUAL Y EJERCICIOS DE LA LENGUA INTERNACIONAL  
**ESPERANTO**, POR INGLADA Y LÓPEZ VILLANUEVA. Precio: **3 pesetas**. — En las principales librerías de España y América y en la administración de este periódico.

La vivado en Port-Artur dum la milito ruso-japana, letero de tie-estanto;  
La Sudafrikaj hereroj;  
Evolucio de la monda komercado kompare kun sciencaj eltrovoj dum la XIX<sup>a</sup> centjaro.  
Multaj literaturaj artikoloj estas nun legeblaj en la monata revuo

### «LINGVO INTERNACIA»

Jare: 4 francoj. Kun literatura aldono: 6 1/2 frankoj. — Prova trimonata abonado 1 fr. 25. — 27, *Boulevard Arago 27, Paris*  
aŭ ĉe gazeto LA SUNO HISPANA — 5, Corona — Valencia (España).